

Thomas Moore,  
La lasta rozo de somero

*tradukita de N. N. 101*

Thomas Moore,  
La lasta rozo

*tradukita de Clarence  
Bicknell*

Thomas Moore,  
'T is the Last Rose of  
Summer

Nun floras de l'somero la sola  
lasta rozo.  
La kunvivantoj ĝiaj velkis en  
mortripozo:  
ne estas flor' parenca, aŭ roz-  
burĝono ia,  
Por ĝemojn kaj ruĝiĝojn redoni  
al alia.

Mi ne vin lasos sole, sur la tron-  
ket' plendeti  
Ĉar la beluloj dormas, vi devas  
kundormeti.  
En morto, sen parfumo,  
l'amikoj jam dormetas:  
Do floron vian teren ĝentile mi  
disĵetas.

Mi tiel volus sekvi se l'amikec'  
finiĝus  
Aŭ la juveloj brilaj de l'amular'  
foriĝus:  
Ĉar se la koroj veraĵ kaj dolĉaj  
ne plu estus,  
En la dezerta mondo volonte  
kiu restus?

...

Jen la lasta rozeto de fora  
somer'!  
Ĝiaj belaj kunuloj jam  
velkis sur ter'!  
Ne restas parenco, ne unu  
rozflor'  
Partoprenas komplete en  
ĝia dolor'.

Mi ne lasos vin velki tut-  
sola, ho roz'.  
Iru dormi kun ili en paca  
ripoz'.  
Nun viajn petalojn  
disĵetas mi for  
Al viaj kunuloj sen viv',  
sen odor'.

Tiel same volonte formor-  
tus mi mem,  
Se ne plu min atendus  
amika manprem'.  
Ĉar kiu kun koro en tiu ĉi  
mond'  
Volus loĝi izola sen amo-  
respond'?

...

'T is the last rose of summer left  
blooming alone;  
All her lovely companions are faded  
and gone;  
No flower of her kindred, no rose-  
bud is nigh,  
To reflect back her blushes, to give  
sigh for sigh.

I'll not leave thee, thou lone one! To  
pine on the stem;  
Since the lovely are sleeping, go  
sleep thou with them.  
Thus kindly I scatter thy leaves o'er  
the bed,  
Where thy mates of the garden lie  
scentless and dead.

So soon may I follow when friend-  
ships decay,  
And from Love's shining circle the  
gems drop away.  
When true hearts lie wither'd and  
fond ones are flown,  
Oh! who would inhabit this bleak  
world alone?

...

Traduko de la Angla poemo “*T is the Last Rose of Summer*” de THOMAS MOORE (\*1779-05-28 – †1852-02-25) en *Esperanton de N. N.* 101.

Arg-530-2211 (2014-11-03 22:41:14)

Tiu ĉi poem-esperantigo troviĝas en <http://www.gutenberg.org/files/38240/38240-h/vol1/e01.htm>.

Traduko de la Angla poemo “*T is the Last Rose of Summer*” de THOMAS MOORE (\*1779-05-28 – †1852-02-25) en *Esperanton de CLARENCE BICKNELL* (\*1842-10-27 – †1918-07-17).

Arg-530-1054 (2014-02-15 13:55:46)

Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi poem-tradukon en folio kun kantoj prezentitaj dum la 12a ĵarkunveno de Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA), la 12-an de oktobro 1968. Pri la tradukinto vidu la retejon [http://eo.wikisource.org/wiki/AEĥtoro:Bicknell\\_C.\\_,\\_Bordigheza](http://eo.wikisource.org/wiki/AEĥtoro:Bicknell_C._,_Bordigheza).

Verkinto de tiu ĉi Angla poemo estas THOMAS MOORE (\*1779-05-28 – †1852-02-25).

Arg-530-1053 (2014-11-04 07:57:07)

Mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun poemon el la retejo <http://www.franks.org/fr01066.htm>. Pri la verkinto, la irlanda poeto Thomas Moore, vidu la vikipedian retejon [http://en.wikipedia.org/wiki/Thomas\\_Moore](http://en.wikipedia.org/wiki/Thomas_Moore).